



Nia forpasinta S-ano Molera prelegante.

ADIAŬ INSTRUISTO

Li ne plu estas inter ni. La falĉilo de la morto segis lian vivon kaj ni restis solaj, orfaj, sen instruisto.

Antaŭ pli ol dudek jaroj, ricevinte informojn de alia giganto de la hispana Esperanto-Movado, D-ro Rafael Herrero, mi aligis al la perkorespondaj kursoj de H.E.F., gvidataj de nia neforgesebla amiko Molera. Li helpis min doni la unuajn paŝojn en la Esperanto-Movado. Mi sentis min izolita en tiu kastilia vilaĝo, kaj li malfermis al mi la larĝan pordon de la mondo, pere de Esperanto. Lia instigo por lernado de la internacia Lingvo, eltiris min de mia duona analfabeteco.

La instruisto pri afableco, simpatio, elokventa parolmaniero; la intruisto, kiu radiigis entuziasmon, laborkapablon, kuraĝon, fervoron... ne plu estas inter ni!!

Post multaj jaroj kaj pro cirkonstancoj de mia vivo kaj eĉ de

Esperanto mem, mi kreis mian familian hejmon ne malproksime de lia urbeto Moyá. Niaj personaj kontaktoj plifirmigis la amikecon inter instruisto kaj lernanto.

Mi ne scias, ĉu mi rajtas paroli nome de aliaj homoj, se mi ne estis rajtigita tiucele, sed mi kuraĝas tion fari. Nome de la miloj da lernantoj de la kursoj per korespondado de li gviditaj, kaj en tiu mia, ni vin dankas, kara instruisto, pro via Esperanta laboro kaj helpo de vi ricevita. Se ni, disĉiploj viaj, estus kapablaj vin imiti, vere ni estus ege feliĉaj. Tion ni celas, kiel veran omaĝon kaj rememoron.

Ploru, hispanaj esperantistoj, ploru Esperantujo; la amiko, la homo, la samideano, la afabla «skandinava hispano», la prestiĝa esperantisto... la instruisto Ramón Molera Pedrals, ne plu estas inter ni!!

Luis Serrano Pérez